

En tiu ĉi numero
Dans ce numéro

EDITO

Edito1
Ekzamenoj en Tuluzo2
Cours hybrides, nouvelle saison.....2
Esperanto-Magazino.....3
Novaĵoj en la libroservo.....3
Lukto kontraŭ la baraĵo de Sivens....4
L'agenda du Kroko.....6

« La Krokodil' » est le bulletin d'information du Centre Culturel Esperanto de Toulouse.

Avant leur parution dans ce bulletin, vous pouvez lire et commenter les articles du « Krokodil' » en ligne sur le Portail de l'Espéranto en Midi-Pyrénées.

Toutes les contributions, en français comme en espéranto, sont les bienvenues. Envoyez-nous vos articles et photos.

« La Krokodil' » est mis en page par des bénévoles avec le logiciel libre *OpenOffice*.

Visitez le portail

<http://esperanto-midipyrenees.org>



ESPERANTO-KULTUR-CENTRO

Centre Culturel Esperanto de Toulouse

31, rue Franc 31000 Toulouse

Tél. : 05 81 34 72 37 - 06 31 80 40 07

E-mail : esperanto.toulouse@free.fr

Site : esperanto-midipyrenees.org

L'année 2014 aura été encore une fois bien remplie pour notre association. Nos bénévoles n'ont pas chômé, comme vous avez pu le lire dans le dernier rapport d'activités.

Le **portail de l'espéranto en Midi-Pyrénées** et sa lettre d'informations *la Krokodilet'* reflète ce dynamisme. Ils sont à la fois une vitrine de l'espéranto mais aussi le rendez-vous des espérantistes et espérantophones de la région. Que ce soit pour vous informer, proposer ou commenter les photos, les articles ou vérifier les rendez-vous dans l'agenda, pour proposer votre aide sur un événement, n'hésitez pas à visiter régulièrement le portail. La **librairie associative** fonctionne bien avec plusieurs commandes en ligne.

L'émission **Esperanto-Magazino**, le rendez-vous hebdomadaire du lundi, s'est bien enrichi cette année avec de nouvelles rubriques en français ou en espéranto, grâce notamment au concours de Léa.

En mai et juin, nous avons eu l'aide précieuse d'Andy, le volontaire cubain. Conscients de l'apport de jeunes volontaires (espérantophones ou non) à la dynamique de notre association, nous prévoyons cette année **d'accueillir deux volontaires en service civique** qui resteront chacun 6 mois. Cette accueil sera plus coûteux pour l'association mais sera sans aucun doute très bénéfique, et nous comptons sur vous pour renouveler, comme vous le faites massivement vos adhésions et de plus en plus vos dons.

Parmi les autres projets phares de cette année, le projet de lancer une seconde **semaine de l'espéranto à Toulouse**, si tout va bien en septembre. En 2012, la première édition de SEMEO avait permis un bon relais médiatique à Toulouse autour de la conférence de Hori Jasuo et Ari Toshinobu ou du concert de Gijom. Nous espérons faire mieux encore cette année.

Bonne année 2015, l'année du 100ème congrès mondial d'espéranto à Lille !

Et bonne lecture !

Marion

En 2015 en Tuluzo, ekzamenoj por la niveloj C1, B2, B1 kaj...

La 30^{an} de Majo 2015, Tuluzo partoprenos por la tria fojo la tutmondan ekzamen-tagon... aldonante sian ŝtoneton!

Ekde 2012, la ekzamena komisiono de UEA kunlaboradas kun la hungara ekzamen-centro ITK por proponi ĉiujare unu tutmondan ekzamen-tagon. Sub la diligenta kunordigado de Katalin Kovats, lokaj organizantoj donis al pli ol 750 personoj en la mondo ŝancon ekzameniĝi kaj ricevi atestilon pri sia nivelo.

Esperanto-Kultur-Centro partoprenis la ekzamen-tagojn en 2012 kaj 2013, sed devis rezigni pri ĝi la pasintan jaron pro manko de interesatoj. Hodiaŭ, je la ĵusa komenco de 2015, mi povas kun granda plezuro anonci, ke la ekzamenoj okazos ĉi-jare en Tuluzo danke al la aliĝo de jam sufiĉa nombro de kandidatoj!



Feliĉaj diplomitoj en 2012 !

Kiel en 2013, ni proponos ekzamenojn je ĉiuj tri kutimaj niveloj kaj en ambaŭ partoj: la skriba kaj la parola. Sed, atendu – ne ĉion mi diris. Sciu, ke nia asocio decidis proponi tute unikan kaj originalan novaĵon. *En Tuluzo, eblas trapasi ankaŭ ekzamenon je la nivelo A2!*

Necesas tuj klarigi, ke tiu A2-ekzameno estos komplete sendependa de la oficiala ekzamen-sistemo – ĝi estas pure loka iniciato. Ĝi ne ebligos akiri oficialan atestilon. Ni tamen garantias, ke tiu krom-ekzameno okazos laŭ kriterioj kaj kondiĉoj kiel eble plej konformaj al la oficialaj. La nivelo A2 estas la dua ŝtupo de la KER-nivelaro (antaŭ B1). Se vi estas interesata de tiu neoficiala ekzameno – kiel lernanto aŭ instruanto – ne hezetu jam anonci vin al mi, kaj vi ricevos ĝis la fino de januaro pliajn detalojn pri ĝiaj enhavo kaj postuloj.

Dume, daŭre eblas registri sin ĉe la retpaĝaro edukado.net por trapasi la oficialajn nivelojn. Mi volonte helpos vin elekti vian nivelon se vi kontaktos min (vidu malsupre).

Kristof

Cours hybrides : nouvelle session dès janvier

Les cours hybrides d'EKC proposent un concept original pour apprendre l'espéranto chez soi... mais accompagné !

Il y a trois ans, notre association mettait en place un type de cours à distance d'un genre peu commun. Les cours hybrides ont pour objectifs les niveaux A2 et B2 et combinent travail de groupe à travers tout un éventail d'outils en ligne, suivi pédagogique, et stages de regroupement pour exercer l'oral.

Ces cours s'étaleront sur environ 5 mois à partir du 24 janvier. Il est encore possible de s'inscrire mais n'attendez pas ! Pour plus de renseignements, contactez-moi.

Christophe Chazarein :

ch.chazarein@esperanto-midipyrenees.org, 06.31.80.40.07 ou 05.81.34.72.37

L'actualité de l'espéranto à Toulouse et ailleurs

Retrouvez l'émission Esperanto-Magazino **tous les lundis soirs de 20h à 21h sur Canal-Sud, 92.2Mhz à Toulouse ou canalsud.net**. Chaque semaine, pendant une heure, des annonces sur l'actualité de l'espéranto à Toulouse et en Midi-Pyrénées, des interviews, des chroniques et de la musique en langue internationale !

Vous pouvez télécharger (format mp3) les émissions de radio (ou uniquement quelques chroniques) sur notre portail. Vous y retrouverez également la liste des morceaux écoutés pendant les émissions, les liens vers les sites dont nous avons parlé. Programme des émissions (horaires approximatifs) :

20h10 : **Quoi de neuf ?**, actualité du mouvement espérantiste

20h20 : **Rencontre(s)**, interviews et reportages

20h30 : **Histoire(s)**, la chronique historique ou linguistique

20h40 : **Tuluzo moviĝas**, la chronique toulousaine en espéranto (La chronique "Tuluzo moviĝas" est régulièrement diffusée sur Muzaiko, la web radio espérantophone.)


20h50 : **L'agenda** de l'espéranto en Midi-Pyrénées

Les émissions sont en français, les entretiens avec des invités étrangers sont en espéranto et traduits ou doublés en français. La chronique "Tuluzo moviĝas" est en espéranto. Vous pouvez vous renseigner sur toutes les musiques que nous écoutons et les télécharger sur vinilkosmo-mp3.com.

Marion

Multaj novaĵoj en nia libroservo

Un petit échantillon des acquisitions de la fin 2014, le reste à découvrir sur la librairie en ligne du portail de l'espéranto en Midi-Pyrénées.

 <p>La Tirano, la liutfariso kaj la tempo Récit allégorique sur un tyran qui veut connaître les pensées de tous ses sujets.</p>	 <p>La vivo de Damoru Un roman satirique traduit du Bengalî.</p>	 <p>Sed homoj kun homoj Panorama illustré des congrès mondiaux d'espéranto.</p>	 <p>Arne, la ĉefido La vie d'un village viking vers les années 800 en Suède</p>
 <p>La ĉashundo de la Baskerviloj Une des enquêtes les plus célèbres de Sherlock Holmes.</p>	 <p>Nova Esperanta Krestomatio Vaste panorama de textes de toute l'histoire de l'Espéranto.</p>	 <p>Dictionnaire pratique Eo-Fr / Fr-Eo Nouvelle version enrichie</p>	 <p>Kavaliriko - Kapriol' Bal Trad, chanson Folk des Pays-Bas</p>

Lukto kontraŭ la baraĵo de Sivens

Jam 4 jarojn, kvindek kilometrojn de Tuluzo, en kampara loketo nomita Testet, okazas lukto por protekti la lastan gravan humidan zonon de la departemento Tarno. Tiun zonon minacas detrui la projekto de baraĵo de Sivens, laŭ la nomo de la loka arbaro, la arbaro de Sivens.

Tiu lukto pli kaj pli diseĥas, kaj kunigas pli kaj pli da homoj. La 25-an de Oktobro, miloj da homoj el la regiono kaj la lando, kunvenis surloke por feste, familie, amase montri sian oponon kontraŭ tiu baraĵo. Konstruadoj, plantadoj, metiejoj, koncertoj, debatoj, okazis la tutan sabaton kaj daŭris dum la semajnfino.

La humida zono de Testet estas la lasta grava humidejo de la akvokolekta areo de la rivero Tescou kaj unu el la plej interesa de la departemento pro sia biodiverseco. La humidejoj estas gravaj lokoj de biodiverseco kaj havas gravan purigadan povon, filtrante la poluaĵojn. Ili ankaŭ kontribuas al renovigo de la subgrunda akvotavolo kaj stokas la karbonon. La baraĵo inundos la humidejon en la sovaĝa kaj prezervita parto de la rivero Tescou. Ĝi entenus 1,5 milionon da kubaj metroj, kiuj kovrus surfacon egalan al 68 futbal-terenoj.

La loko gastigas riĉan biodiversecon, multajn plantajn kaj bestajn speciojn. Almenaŭ 94 el ili estas protektataj : insektoj, amfibioj, reptiloj, 40 specioj de birdoj, mamiferoj, 1 specio de fiŝo, 18 specioj de kiropteroj.

Tiu baraĵo, prezentita kiel komuna intereso, estas fakte sepdek-procente destinata al intensa akvumado de dudeko da bienoj kaj tridek-procente por certigi minimuman elfluokvanton kaj rezulte diluadon de poluaĵoj.



La oponantoj taksas la projekton ne taŭga, kaj ĝian financan koston altega por la natura medio. Plie, en la preparado de la projekto estis multaj nigraj zonoj. Tiun projekton, jam 40 jarojn subportis la departementa konsilio de Tarno kaj ĝia reprezentanto en la afero, la CACG, entrepreno pri grandaj laboraĵoj. Tiu entrepreno akiris tiun profitplenan kontrakton, farinte studon kiu pravigis la projekton. Okulfrapa intereskonflikto! Kaj en tiuj studoj

ŝajne multaj ciferoj estis manipulitaj, pri kio, de 2011, konsentis respondi nek la departemento nek la Prefektejo.

La projekton fincos cent procentojn publika fonduso (8 400 000 € kiel investo), kaj la funkciada kosto estus je 360 000 €/ĉiujare dum 20 jaroj.

Precipe, la projekto profitos al agrokulturaj praktikoj intensivaj, industriaj, produktismaj, kiujn la oponantoj konsideras kiel sakstraton kaj por la agrokulturistoj kaj la tuta socio. Ĉar ĝi estas evidenta frakaso por la laboreco. Pli kaj pli da bienoj malaperas, restas nur la plej grandaj, fortaj, industriaj. Ĝi estas frakasa ankaŭ por la sano de bienistoj kaj de konsumantoj, pro ekzemple la amasa uzado de pesticidoj, frakasa por la natura medio (poluo, nova uzo de GMO), frakasa por la publikaj financoj (granda subvenciado).

Kontraŭ tiu projekto de baraĵo, unua kolektivo de asocioj pornaturaj aperas en 2011. Tiu kolektivo denuncas la perdon de biodiverseco pro tiu projekto kaj starigis plendojn antaŭ juĝejo.

Sen atendi la lastajn juĝojn pri la esenco, la prefekto rajtigis la ekkonstruon en oktobro 2013. Aktivuloj tiam decidis okupi la lokon. Ili kuniĝis kadre de alia kolektivo Tant qu'il y aura des bouilles « dum estos plu marĉejoj », ilia agado sukcesis prokrasti la komencon de la konstruado je pli ol unu jaro.

La okupado iĝis nova ZAD, el la franca *Zone à défendre*, « defendenda zono ». La plej fama ZAD kreiĝis

en Notre-Dame des Landes kontraŭ konstruado de dua flughaveno apud Nanto. En pluraj lokoj, kie civitanoj per okupado malhelpis la daŭrigon de malutilaj grandaj projektoj, aperis tiu koncepto de ZAD.



Unue, la zadistoj okupis forlasitan domon, sed perforte estis elpelitaj. Ili konstruis dometojn, muntis tendojn, plurfoje, perforte estis elĵetitaj, priŝtelitaj, timigitaj. Ili organizis rezistadon, informadon kaj mastrumis sin per ĉiusemajnaj ĝeneralaj asembleoj kaj senhierarkia organizado. Trans baraĵo, tutan sistemon oni pridiskutas kaj denuncas. Lukto kontraŭ la baraĵo iĝas simbola lukto por alia mondo.

Subtenaj kolektivoj kreiĝis en la apudaj urboj Rabastens, Albio, Tuluzo, kaj eĉ pli fore. Subtenantoj kelkfoje ankaŭ venis provizore okupi la lokon kiel tiuj ŝafistoj migrantaj kun siaj ŝafoj. Luktas ili kontraŭ devigata elektronika blatado de siaj ŝafaroj, kontraŭ industriigo de sia laboro, kontraŭ sama sistemo.

Malgraŭ la spitado de la okupantoj, la detruo de la arbaro komenciĝis la 1-an de Septembro 2014. Trideko da hektaroj estis senarbitigitaj, sub altgrada protekto de ĝendarmoj. Prefere ol konsenti la ripetitajn petojn de sendependaj ekspertizoj kaj de dialogo, far la kolektivoj de oponentoj, la decidistoj rompas la pordon, ne atendante kortuman juĝon. Kaj tio okazigas multajn policajn perfortojn.

Aktivuloj kaj pli kaj pli da civitanoj ekkonsciis pri la neutileco de la baraĵo, la represio de la polico kaj la fifaroj de ĝiaj subtenantoj. Preskaŭ ĉiam la respondo de la aŭtoritatoj estis represio, neniam venis propono de dialogo.

Memorindaj bildoj de tiu longa lukto : tiuj junuloj alte sidantaj sur arboj, en kabanoj, tiuj kiuj enteriĝis ĝis kolo por malpermesi la veturon de detruaj maŝinoj, la simbola enfamilia replantado de arboj unu semajnon post la senarbitigo, tiuj liceanoj, kiuj strikis por denunci la projekton, la fastostriko de 6 homoj, dum pli ol 30 tagoj ĉe 3 el ili.

Sabaton, la 25an de Oktobro, estis la unua datreveno de la ZAD, la du kolektivoj alvokis grandan subteneventon kiu arigis pli ol 5000 personojn. Nu, ĉu tiu sufiĉos por haltigi la projekton, eble ne, sed la luktantoj decidoplene plu elkrias :

Ili faligis la arbaron, ni enradikigu la reziston !


Dum nova perforta nokto post la sabata kolektiĝo, ie kie estis gardantaj policistoj kaj ĝendarmoj, mortis junulo, Rémi. En la sekvaj tagoj, omaĝe kaj subtene, okazis multaj manifestacioj, pluvis multaj reagoj. Kiam mi verkis tiun rubrikon, oni ankoraŭ ne precize sciis kial kaj kiel li mortis.

Marion

Aliaj artikoloj en esperanto aperis el la blogo <http://neniammilitointerni.over-blog.com/>
Por sekvi la aferon (en la franca) : <http://tantquilyauradesbouilles.wordpress.com/>

Cet article est basé sur la Chronique "Tuluzo moviĝas" diffusée dans l'émission [Esperanto magazino](#) du 27 octobre et sur Muzaiko.info, la webradio 100 % espérantophone le 2 novembre 2014.

L'agenda du Kroko'



Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : esperanto.toulouse.free.fr
Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christophe au 06.31.80.40.07 ou 05.81.34.72.37, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr

JANVIER - JANUARIO 2015

Ven. 09 jan. : Repas-Tchatche / Manĝo-klaĉo

Horaire : 20h

Lieu : chez Marc Roger (05)

Lun 13 jan. : Esperanto Magazino

de 20h à 21h sur canalsud.net ou 92.2Mhz à Toulouse

Emission de Radio – Musique en espéranto et chroniques (et tous les lundis soirs sauf vacances)

Mardi 13 jan. : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses.

Jeudi 15 jan. : Début du cours express

Les bases de l'espéranto en 5 semaines

Horaire : 18h30 - 20h30

Lieu : ENSEEIHT, 2 rue Charles Camichel

Samedi 17 jan. : Galette des rois

Les cheminots espérantistes toulousains invitent

Horaire : 15h

Lieu : Local du TEF, Centre SNCF Surcouf fléché à partir du 48 avenue Plana

Samedi 24 jan. : Premier regroupement

Autoformation guidée

Horaire : matin

Lieu : Maison des associations Niel.

Mardi 28 jan. : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses.

FEVRIER - FEBRUARO 2015

Ven. 6 fév. : Repas-Tchatche / Manĝo-klaĉo

Horaire : 20h

Lieu : Maison de Quartier Rangueil, 19, rue Claude Forbin (Metro Rangueil)

Mardi 10 et 24 fév. : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses.

Du 14 au 21 fév. : Stage choral en espéranto

Lieu : à La Bastide sur l'Hers en Ariège

avec la Chef de chœur bulgare Zdravka BOYTCHIEVA

Sam. 28 fév. : Stage « Découverte de l'espéranto »

Horaire : De 9h30 à 17h

Lieu : MJC de Cahors , Lot

MARS - MARTO 2015

Mardi 10 et 24 mars : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses.

Mer. 19 mars : Atelier « Découverte de

l'espéranto » Horaire : 20h30

Lieu : Maison de Quartier Rangueil, 19, rue Claude Forbin (Metro Rangueil)

Ven. 20 mars : Réunion de travail Projets régionaux

Horaire : A partir de 19h

Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans

Samedi 21 et dimanche 22 mars : Stage weekend

Horaire : 9h30 le samedi à 17h le dimanche

Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans
3 niveaux : débutants, intermédiaires, conversation

PLUS TARD – PLI POSTE 2015

Samedi 30 mai : Session Examen mondial

Oral et écrit pour niveaux A2 (non officiel)

B1, B2, C1 (officiels)

Lieu : Toulouse

Samedi 6 et dimanche 7 juin : Stage weekend

Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans
3 niveaux : débutants, intermédiaires, conversation